

Beboj praktikas mensan trejnadon



Israelo: mobilizado en la civitana socio kontraŭ la elpelado de afrikanoj

Irano urĝas Turkion tuj haltigi operacon en Sirio

Michael PHELPS raportis senkuraĝigon kaj penson pri sinmortigo

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Farita per:



Scribus
Open Source Desktop Publishing

Turka armeo komencis teran operacon en siria regiono Afrin

La turka armeo eniris Sirion p. 03

Irano urĝas Turkion tuj haltigi operacon en Sirio

Por eviti plimalboniĝon de humanitara situacio en norda Sirio p. 03

Iraka federacia kortumo rifuzas prokraston de ĝenerala elekto

12-an de majo p. 04

Germana Social-Demokratia Partio traktos kun Konservativa Unio formadon de koalicio

362 voĉis por plua intertraktado p. 04

Israelo: mobilizado en la civitana socio kontraŭ la elpelado de afrikanoj

Preskaŭ 40 000 afrikanoj en neregula situacio p. 05

Beboj praktikas mensan trejnadon

Ili ekzercas sin - tiel diri - en silento p. 06

Michael PHELPS raportis senkuraĝigon kaj penson pri sinmortigo

La plej elstara gajninto pri olimpikaj medaloj de la historio p. 07

Hodiaŭe

George ORWELL; kaj Birdo p. 07

Quo vadimus, homines?

Recenzo pri Mil naŭcent okdek kvar p. 08

Turka armeo komencis teran operacon en siria regiono Afrin

Turka ĉefministro Binali YILDIRIM dimanĉe [21 jan 2018] deklaris, ke tiumatene la turka armeo eniris Sirion por tera operaco en la siria norda regiono *Afrin*. Tiutage la turka urbo *Reyhanli* proksima al la landlimo kun Sirio estis atakita per raketoj. Unu homo mortis kaj 32 aliaj estis vunditaj.

YILDIRIM faris televidan paroladon dimanĉe [21 jan 2018] en Istanbul, dirante, ke la turka trupo, kaj la ribela Siria liberiga armeo eniris



Sirion el la turka flanko, markante kompletan komencon de la tera operaco. YILDIRIM diris, ke la operaco direktita al la kurdaj armitaj fortoj estos dividita en kvar fazojn kaj celas starigi sekuran zonon profundan je 30 kilometroj. Li aldonis, ke la operaco estas direktita al teroristoj, sed ne al civiluloj, nek influos la Astanan procezon pri Sirio kaj la okazigon de la pintkunveno en la Rusia urbo Soĉio.

La turka televido NTV raportis, ke la Turka landlima urbo *Reyhanli* estis atakita per raketoj. Tri raketoj estis pafitaj el Sirio.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Irano urĝas Turkion tuj haltigi operacon en Sirio

La Irana Ministerio de Eksterlandaj Aferoj dimanĉe publikigis deklaron, esprimantan esperon, ke Turkio tuj haltigos militan operacon en la Siria regiono *Afrin* por eviti plimalbonigon de humanitara situacio en norda Sirio.

Proparolanto de la ministerio, Bahran GHASEMI, diris en deklaro, ke la Irana flanko substrekas protekton de la teritoria integreco de Sirio kaj respekton al la siria suvereneco.

GHASEMI diris, ke Irano esperas, ke Turkio, kiel unu el la koncernataj landoj de la Astana procezo pri solvado de la siria demando, restos



fidela al sia promeso pri diplomatia solvo al la siria krizo kaj ludos plu konstrueman rolon sub la kadro de la Astana intertraktado. Li aldonis, ke la nerespondecaj kaj provokaj agoj de iuj landoj, inkluzive de Usono estas la radikalaj kaŭzoj de la malboniĝo de la siria krizo.

Turka prezidento Recep Tayyip ERDOĞAN [ré'dʒep tāj'jip 'ærdɔ(ɯ)an] sabate [21 jan 2018] anoncis, ke la turka armeo jam eniris la sirian regionon *Afrin* proksiman al norda Turkio por operaco kontraŭ kurdaj armitaj fortoj. Analizistoj montris, ke la lastatempa decido de Usono pri formado de landlimaj sekurectropoj en Sirio eksplodigis la turkan operacon.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Iraka federacia kortumo rifuzas prokraston de ĝenerala elekto

La Iraka federacia kortumo decidis, ke ne povas esti malfruigita la ĝenerala elekto de la lando, por fini debaton de la politikaj partioj pri prokrasto de la elektado.

Ayas AL-SAMOUK, estro de la gazetara oficejo de la kortumo, diris en konciza deklaro, ke la Plej Supera Federacia Kortumo publikigis "interpretan decidon" pri Artikolo 56 de la Iraka Konstitucio, indikanta, ke la tempo por elekti la membrojn de la nova parlamento en la ĉi-rilata artikolo devas esti respektata.

SAMOUK diris, ke la decido de la kortumo estis farita je nur kelkaj horoj, post kiam la iraka

parlamento prezentis peton al la kortumo por interpreti la artikolon de la konstitucio, serĉante, ĉu eblas esti prokrastita la elektado, ĉar iuj politikaj blokoj tion postulas.

Ĵaŭde [18 jan 2018], la dato de la ĝenerala elekto la 12-an de majo [2018] ne povis esti aprobita de la Iraka parlamento meze de intensa debato inter la politikaj blokoj.

Merkrede [17 jan 2018], la sunaista ĉefa parlamenta koalicio petis prokrasti la ĝeneralan elekton je ses monatoj, por permesi milojn kaj deklimojn da delokitaj sunaistoj reveni hejmen por ĵeti siajn balotilojn post la liberigo de siaj urboj kaj urbetoj el la Islama Ŝtato.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Germana Social-Demokratia Partio traktos kun Konservativa Unio formadon de koalicio

Delegitoj el la germana centrmaldekstra Social-Demokratia Partio dimanĉe [21 jan 2018] voĉdonis por formala intertraktado pri koalicio kun Konservativa Unio gvidata de ĉefministro Angela MERKEL.

Inter 642 delegitoj ĉeestantaj la specialan kongreson en Bonno, 362 voĉis por plua intertraktado pri koalicio kun la Kristan-Demokratia Unio kaj ĝia bavara frata Kristan-Sociala Unio, 279 voĉis kontraŭ tio, kaj unu alia sin detenis.



La decido, kiu estis farita post intensaj debatoj inter delegitoj, purigis la vojon formi renovigitan Grandan Koalicion inter la Social-Demokrata Partio kaj la Konservativa Unio, preskaŭ kvar monatojn post la federacia elekto, en kiu ambaŭ blokoj suferis la plej gravan perdon de voĉoj de post 1949 .

La du blokoj komencos la intertraktadon eble en la proksima estonteco. Prezidanto de la Social-Demokrata Partio Martin SCHULZ alvokis la kongreson subteni la intertraktadon bazitan sur la atingoj de la lastatempa esplora dialogo.

Yu
Ĉina Radio Internacia



Israelo: mobilizado en la civitana socio kontraŭ la elpelado de afrikanoj

Ekde la fino de marto, la Israela registaro planas elpeli preskaŭ 40 000 afrikanojn en neregula situacio, ĉefe sudananojn kaj eritreanojn, kiuj alvenis en Israelo antaŭ la jaro 2012. Tiu plano pri amasa elpelado estigas malmulte da kontestado ĉe la opozicio. Sed la civitana socio mobiliziĝas por fari premon al la ekzekutivo.

35 viroj kaj virinoj, verkistoj kaj figuroj de la israela literaturo, kiel Amos OZ, David GROSSMAN aŭ Zeruja ŜALEV, subskribis publikan deklaron petante de la registaro, ke ĝi ne efektivigu la elpeladplanon.

«Tiuj viroj kaj virinoj, kiuj surhavas sur siaj korpoj kaj animoj la cikatrojn de sia fuĝo kaj de la torturo en la kampadejoj de Sinajo, havas nur unu deziron: plue vivi», asertas la teksto.

La subskribintoj juĝas aliparte, ke Israelo ne frontas la samajn migradajn

defiojn ol Eŭropo kaj Afriko substrekante, ke tiuj azilpetantoj reprezentas malpli ol 0,5% el la israela loĝantaro.

Kampanjo, kiu celas kaŝi afrikanojn minacitajn je elpelado

Siaflanke, pluraj rabenoj subskribis alian malferman leteron adresitan al la registaro postulante, ke ĝi ĉesigu tion, kion ili priskribas kiel «kruelan politikon kontraŭdire kun la juda tradicio».

«Kiel juda ŝtato, ni ne povas ignori la plorojn de tiuj homoj en mizero», skribas tiuj religiuloj.

Susan SILVERMAN, rabenino, pretas lanĉi kampanjon celantan kaŝi afrikanojn minacitajn je elpelado.

Ŝi asertas, ke tiun iniciativon inspiris al ŝi la historio de Anne FRANK, juda adoleskantino kaŝita dum la dua mondmilito, por eskapi la naziojn.

Neniam Milito Inter Ni

Beboj praktikas mensan trejnadon

Multaj gepatroj konas tiun surprizan momenton: Ŝajne tranokte la idoj lernis rampeti, iri aŭ paroli. Mezuradoj de cerbaj kurentoj nun montras: La beboj vere jam delonge trejnadis por tio.



Fakte la evoluo ĉe la plej multaj beboj ne okazas lineare, sed laŭtendence en formo de saltetoj. Subite la beboj ekprenas unuafoje ludilon, turniĝas sen ekstera helpo sur la ventron aŭ elbuŝigas ekkoneblajn vortojn, post kiam dum tagoj apenaŭ io tia estis okazinta. Evolupsikologoj jam de sufiĉe longa tempo antaŭsupozis ke tiuj progresoj nur ŝajne okazas kvazaŭ tra unu nokto. Verŝajne la bebaj cerboj je longa vido preparas sin por la novaj kapabloj. Ili ekzercas sin - tiel diri - en silento.

Tiun tezon prilumigis la esploristoj de la Pensilvania Ŝtata Universitato en Usono helpe de mezurado de cerbaj kurentoj. Entute 28 beboj dum ses monatoj partoprenis en la regulaj eksperimentoj, ĝis ili aĝis unu jaron.

La testo plenumiĝis laŭ klasika evolupsikologia koncepto laŭ Jean PIAGET (A-ne-B-serĉeraro). Tiucele la esploristoj kaŝis ludilojn alterne en malsamaj ujoj kaj la beboj devis trovi ilin.

Tiel interalie eblas konstati je kiu grado la bebo jam disponas pri la tiel nomata objektrilata aŭ personrilata daŭripovo - t.e. ĉu ili scias ke objektoj kaj homoj daŭre ekzistas eĉ se ili ne plu estas videblaj - kio estas sufiĉe kompleksa kognativa produktivo. Tiu paŝo en la evoluo de bebo okazas averaĝe inter la oka kaj dekdua vivomonatoj.

Dum la esplora periodo ankaŭ daŭre estis registrataj la cerbaj kurentoj el malsamaj cerbaj regionoj. La observebla konduto ĉe la eksperimentoj korespondis al la spertoj de la prizorgantoj el la ĉiutago. Ĉe plej multaj etaj testantoj je la komenco kaj je la fino de la duonjara esplora periodo apenaŭ aperis videbla ŝanĝo. Iam inter la sepa kaj dekunua vivomonatoj aliflanke preskaŭ ĉiuj estis farintaj saltecan progreson de sia evoluo. Subite ili majstre plenumis la testojn sen longa pripensado aŭ hezitado.

La cerba aktiveco aliflanke montris tute alian bildon. Ja estis diferencoj inter la beboj - precipe rilate al la rapideco, sed ĉe ĉiuj estis mezureblaj linearaj kaj ne saltecaj ŝanĝoj. Tio subtenas la tezon ke bebaj cerboj vere konstante trejnadas sin por novaj kapabloj kiuj aperas subite ekstere.

Esperanta Retradio

Michael PHELPS raportis senkuraĝigon kaj penson pri sinmortigo

La plej elstara gajninto pri olimpikaj medaloj de la historio, la usonano Michael PHELPS, raportis ĉi-semajne kadre de iu konferenco en Ĉikago (Usono), ke li estis trafita de senkuraĝigo kaj eĉ pensis pri sinmortigo.

Malkaŝe priparolante tiun temon, tiu eksnaĝisto klarigis, ke lia plej severa krizo okazis post la Somera Olimpiko 2012, okazinta en Londono – tiam li gajnis ses el siaj 28 medaloj: “Tiam mi volus ne plu esti sportisto; mi volus ne plu esti vivanto”. En tiu tempo ofte li estis restanta sola

dormoĉambre dum tri ĝis kvin tagoj, nek manĝante nek sufiĉe ripozante.

Agado kadre de altkvalita sportumado multe kostis al li, kaj liaj problemoj tiurilate komenciĝis en la jaro 2004-a: “Verdire post ĉiu olimpiko mi estis sentanta krizon pri senkuraĝigo”. Laŭ li, ne estis simpla la decido akiri helpon, sed la kuracado savis lin.



Laŭ PHELPS rakonti sian sperton, kiu eble povos utili al aliaj homoj, konsistas el pova oportuno: “Mi tre dankas min, ke mi ne

estingis mian vivon”.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



George ORWELL

George ORWELL [ĝorĝ or'uel] (naskiĝis la 23-an de januaro 1903 [kiel Eric Arthur BLAIR], mortis la 21-an de januaro 1950) estis angla aŭtoro.

En Esperanto aperis: *La Besto-Farmo; Mil naŭcent okdek kvar.*

Vikipedio



Bildo de la tago

Nyctanassa violacea.

Vikipedio

Quo vadimus, homines?

ORWELL, George. *Mil naŭcent okdek kvar* / Tradukis el la angla Donald BROADRIBB. – 2a eld. – Nov-Jorko: Mondial, 2012. – 288 paĝoj.

«Ne diru kun sopir': "ne plu" / Sed kun dankemo: "estis ili"» *Donald BROADRIBB, brila esperantologo, vortaristo, recenzisto, redaktoro, kaj tradukisto el la angla, helena kaj hebrea, ve, forpasis oktobre 2012 en Aŭstralio, lasinte al ni tradukon de la romano *1984* far George ORWELL (plumnomo de Eric Arthur BLAIR) – unu el la plej ŝatataj kaj citataj britaj aŭtoroj en la 20a jarcento.

La romano estas prave konsiderata unu el la plej gravaj kontraŭ-tirismaj (mal)utopioj, fonto de konategaj citaĵoj kaj nocioj (Granda Frato, novparolo, duoblapenso, pensakrimo...) kaj defioj pripensendaj kaj ne-tuj-facile solveblaj, kiujn la homaro alfrontas dum tuta sia registrita kelkjarmila historio: kio estas Libero, Vivcelo, Vivenhavo, Valoroj? Ĉu ni, homoj, bezonas "ŝtaton"? Ĉu gravas/indas scii la veran historion (kiun fakte kreas registoj)? Ĉu la ŝtato rajtas mortigi? Ĉu oni prefere restu sklavo sed viva ol pereu en ĥaoso? Ĉu io ajn entute de ni dependas?

Oni plu diskutas kaj disputas pri la mesaĝo de la verko, ties literaturaj ecoj, la politikaj emoj kaj mondrigardo de la aŭtoro kiu dum sia nelonga vivo (1903–1950) sukcesis partopreni gravegajn eventojn kaj dramece evoluigi sian mondrigardon – de konservatismema oficisto en Birmo ĝis socialisto kaj arda ano de trockiismo dum lia partopreno en la Hispana interna milito en 1936, en kiu li vidis kiel drame ŝanĝiĝis la socia situacio post la venko de FRANKO kaj kiel lie la "komunistoj" fakte kunlaboris kun la faŝistoj. Ĉu ne tiam li konceptis la tiom trafajn bildojn en la verkota *La Besto-Farmo* – kies ĉefa ideo estas perfido de idealoj kaj misuzo profitcela?

Laŭ iuj esploristoj, ORWELL restis ĉiam "socialisto". Ĉu povus "socialisto" verki tiom kontraŭtiranian romanon? Ja laŭ iuj, "socialismo" egalas stalinismon, gulagon, tiranion... – se nur komenci demandi. Socialismo kun homa vizaĝo?

La "oligarĥia kolektivismo" (korporacia komunismo, ĉu ne la sama afero ol faŝismo?), prezentita de la "renegato" GOLDSTEIN en la romano, evidente reflektas ideojn de la aŭtoro pri STALINO kaj la reĝimo, kiun tiu kreis en la konata lando.

Winston SMITH, la protagonisto, ano de la reganta ĉiopotenca "Partio" gvidata de "GF", vivas en oligarĥia socio – fakte sklavposeda – de preskaŭ absolute domina

"duoblapenso", kie ne nur mankas plej elementaj necesajoj eĉ por la partianoj, regas totala mensogo, timo, envio, malico, socia dispecigo, obtuzigo de la ordinara vivo, ĝisnaŭzaj neelteneblaj malmoralajoj, apatio, manko de ajna solidareco kaj kompatemo, inteligento aŭ espero, preteco tuj perfidi senrimorse, sed forestas la vivosenco mem, ĉar, laŭ la registroj, ne ekzistu normalaj homaj interrilatoj, nek pensantaj memorkapablaj individuoj, nek paco nek io ajn – la mem historio ne ekzistas, kaj veraj kompreneblaj nocioj ne rajtas ekzisti – "milito estas paco". Cetere li mem laboras ĝuste kiel eliministo de la historio...

Li serĉas lastajn eblojn resti integra homo, esperas trovi samideanojn kaj ke la proloj ivos ion ŝanĝi, kaj mem ribelas kontraŭ la sistemo per kvazaŭ ŝanca amafero kun koleĝino Julia – junulino kiu sie volis venĝi la Partion – sed neeviteble trafas en la ferajn tenaĵojn de la reĝimo, kiu nesciate seninterrompe gvatis ĉiujn liajn movojn, evidente de la trea komenco (mistike WINSTON songis anon de la "Interna Partio" O'BRIEN, diri "Ni renkontiĝos en la loko kie mankas mallumo" jarojn antaŭ ol tiu rivelis sin al li kiel Fratarano rolanta ĉefa ŝajnkomplotanto

sed evidentiĝonta lia ĉefa torturonto kaj “sanigonto”, aŭ kiel oni sciis ke li vidis pruvon ke unu el la vaporigotaj revolucigvidantoj vere ekzistis). Neelteneblaj torturoj finfine “sanigas” lin kaj senigas de ajnaj fajreroj resti vera homo.

“Duoblapenso” – eble centra nocio de la romano, kompleksa, ne simple komprenebla, detale pritraktita, kvazaŭ kvantumfizika – samtempe havi du malajn opiniojn, sciante ke ili sin kontraŭdiras, kaj kredante ambaŭ; konscie malkonsciiĝi, kaj poste, denove, malkonsciiĝi pri la hipnotiĝo kiun oni ĵus faris en si.

Eĉ por kompreni la vorton necesis uzi duoblapenson. Ĉu ni ne vidas, se bone atenti, signojn de tio en la agoj kaj diroj de iuj el ni?

La traduko estas individueca, preskaŭ senriproĉa kaj modela, pli bona ol la fonta, saturita per ĉiam zorgaj kaj ofte agrablaj eltrovaĵoj – krom ke la historio tenas vin streĉa, vi ĝuas la glatan liveradon. Jen kelkaj menciindaj tradukaj solvoj el tre longa listo: “Senscio” (*ignorance*); “ŝalma flamo” (*blowlamp*); “senekzistigo” (*annihilation*); “mencieto en taŭga loko” (*a hint in the appropriate quarter*); “resaltejo” [*gazono*] (*springy [turf]*); “planis mangrenadon” (*designed a hand-grenade*); “Olduleto” (*old boy [adrese]*); “publoj” (*pubs*); “Vi pensis pri trompi min”; “tutdume”; “trapensi”...

Tamen iujn nemultajn vortojn mi trovis misaj aŭ almenaŭ pridiskutindaj, ekz. “Preter la maro” (*beyond the sea*) – eble tamen “fore post la maro”; “preter la malfruaj kvindekaj jaroj” (*beyond the late fifties*) – eble tamen “antaŭ la fino de la kvindekaj jaroj”; “lerta vizaĝo” (*clever face*) – eble tamen “inteligenta”, aŭ “saĝa” [kvankam ŝajne taŭgas en “Tre lerta sepjarulino, ĉu ne?”] (*Pretty smart of a nipper of seven, eh?*) (pri ido kiu sukcesis lerte denunci); “senfina dialogado” – kiam temis pri “monologo” de WINSTON kun si mem, sed ŝajne taŭgas; “Departemento de Reserĉado” – *Research Department* – ĉu tamen “esplorfako” (-departemento)?; “nefamiliara” [besto] (*unfamiliar*)

animal – eble “ekzotika”.

La tradukinto ne tro zorgis imiti iujn ne-tre-normajn anglajn lingvaĵojn (de “proloj”), verŝajne prave, ja Esperanto estas tro regula por ĝin kripligi sen drastaj postsekvoj.

Aparte interesaj estas La principoj de novparolo en la apendico – kvankam iel la formalaj meĥanismoj similas al tiuj de Esperanto, kvankam kompreneblas, ke la du lingvoj havas malsamajn celojn.

Ĉu la antaŭvidita mondo ne realiĝis aŭ realiĝos jam antaŭ la jaro 2084, kiel supozas BROADRIBB? Mi samopinionas kun tiuj, kiuj vidas ke la orŭela socio iĝas nuna realaĵo, sed en oble hororiga formo, se bone pensi.

Antaŭ nelonge min mirige ŝokis miaj propraj supozoj, ke ORWELL fakte apologias la malhomigan reĝimon kaj la fina frazo “Li amas Grandan Fraton” estas celo de la homoj – fina paciĝo kun si mem, kun la realeco, kaj saviĝo – kvazaŭ estus dilemo inter resti homo aŭ iĝi “sana” angsoce en la ĉion-stringa amo de la Granda Frato.

Ja ortodokso estas nekonscio, kaj ĉu ne estas beno resti feliĉa en la permesitaj framoj, sen la devo ion decidi, peni kaj dubi? La demandoj restas kaj nur ni, la homoj de nia dume sole havebla planedo, povas decidi kaj fari kion ni povas, ĉiu el ni, de kiu ĉio plia kaj plua dependas.

Andrej PEĈONKIN

NOTO

* Vasilij ĴUKOVSKIJ. *Rememoro* / Tradukis el la rusa Valentin MELNIKOV // La Ondo de Esperanto, 2008, №7.

La Ondo de Esperanto, 2013 n° 2 (220)